Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 05/08/2021 Kvincentkvardekdua eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo*

*Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo*

*Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 810,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas **280,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **227,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **200,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas **103,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde decembro 2021)

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER"

(de Mason Stuttard). N.ro 46 de "Por Komencantoj".

GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). En la kompleksa frazo "Tiu kiun mi ĉiam povis fidi estis dum dek jaroj mia fidela amiko", A). kial la vorto "kiun" estas en la akuzativo kaj kiu vorto estas la rilata pronomo? kaj B). kiu vortoi estas la gramatika subjekto en la ĉeffrazo kaj kiu vorto en la suborda frazo?

2). En la kanto "La Espero" troviĝas en la unua strofo la longa frazo "Ne al glavo sangon soifanta ĝi la homan tiras familion" A). kio estas la suborda frazo? kaj B). kio devas esti la normala, ne poezia, sisekvo de la esprimo "ĝi la homan tiras familion"? kaj C). kial la vorto "homan" kaj kial la vorto "familion" estas en la akuzativo?

3). En la longa frazo en numero 2). la vicordo de "al glavo sangon soifanta" normale estas "al sangon soifanta glavo"; kial la vorto "sangon" ricevas la akuzativon ĉi tie?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 542. *Marcel Leereveld.*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au



## La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.



Esperanta Retradio

Legi malsanon en vizaĝo 2a Augusto 2021

# " Kiel oni fariĝas ekskomencanto."

La kurso kiu instruas kiel legi, aŭskulti kaj revizii ĉiun tagan Esperanton - Duolingo

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn.

**Artikoloj por AE.** Se vi trovas taŭgan artikolon por AE kaj ne fidas vian Esperantan nivelon, vi povas uzi la aŭtomatan tradukilon de Guglo kaj sendi ĝin rekte al AE *Roger Springer*

***Google Translate*** estas bonega tradukilo por vortoj anstataŭ uzi vortaron. Metu la ligon sur vian ekranon.

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)*



## N e k u t i m a j  e k z a m e n o j  e n  A. E. A. .

**STRIKTU KONTRAŬ LA VIRUSOJ!**

Bonŝance Viktorio havas nun malpli da sociaj limigoj pro la batalo kontraŭ la virusoj, unu el kiuj, Delta, estas tre danĝera. La viktoria registaro faris la ĝustajn limigojn kaj liberecojn en la cirkonstancoj. Gratulojn al ĝi! Homoj kiuj preferas havi riskojn kun la libereco por la virusoj pensas ke ili estos pli bonŝancaj ĉar ili estas pli fortaj ol vi kaj mi. Dankegon! Eĉ ili suferus en la tempo de la pesto kaj aliaj gravaj malsanoj. Ili provu! Koncerne la ekonomion: ni jam tro foruzas la suprajôn de nia planedo, rezultante en estonta manko de manĝaĵoj. Ĉio pro nia riĉa ekonomiaĉo. Rigardu kiom da uzeblaj kaj uzindaj objektoj oni forĵete metas sub la teron. Fine la subtero estos pli riĉa ol la surtero. Kia stulta ekonomio! La ekonomio plibonigi kaj adapti artiklojn estas pli bonsenca ol la ekonomio kiu forĵetas la estanton kaj kreas similaĵojn novajn.

Alie temas pri ideoj. Forĵeti ideojn kaj akcepti novajn ideojn ne rezultas en foruzadon de la surfaco de la planedo, sed pri ŝanĝiĝo en niaj mensoj, ne foruze. Do ne timu rigardi novan specon de ekzamenoj. *Marcel Leereveld.*

*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

## NOVSPECAJ EKZAMENOJ.

Antaŭ du semajnoj mi klarigis, ke antaŭ kelkaj dekoj da jaroj A.E.A. havis krom la kutimaj ankaŭ novspecajn ekzamenojn, en kiuj oni ne serĉis la erarojn, sed la bonaĵojn. Juĝi tiajn estas multe pli malfacila por la ekzamenistoj, kaj multe pli temporaba. Verŝajne pro tio oni ne plu havas ilin en A.E.A., kvankam ili floradis dum multaj jaroj kaj estis ĉe la ekzamenatoj tre populara, ne ĉar ili estis pli facilaj, ili ne estis, sed ĉar oni sciis antaŭe kiuj ducent aŭ mil vortoj kaj kiu parto de la gramatiko estus en la ekzamenoj. Pro ĉilasto oni teorie devis havi ĉiujn vortojn kaj ĉiun gramatikon ĝusta por sukcesi, sed pro eblaj cirkonstancaj malfacilaĵoj la sukcesprocentaĵo estis 80%. Nur unu aŭ du homoj ne komprenis tion kaj postulis sukceson ĉe 50%. Malgraŭ la 80%, ege malmultaj homoj malsukcesis . La juĝado estis tiom temporaba, ĉar la ekzamenistoj devis eltrovi kiomfoje ĉiu bona vorto aŭ gramatikaĵo enkalkuliĝis. Mi memoras fari tion kaj konsili la ekzamenistojn en aliaj urboj uzi miajn listojn. Jen la instrukcioj en la komenco de la Meza Ekzameno, kiuj estis en la angla lingvo ĉar ili ne estis parto de iu ekzamendemando:

"Ĉi tiu ekzameno baziĝas sur la gramatikaj reguloj de Esperanto kaj sur la listo de 1000 vortoj havigitaj al la eventualaj ekzamenotoj. Por sukcesi, la ekzamenoto devas scii ĉiujn mil vortojn kaj la gramatikon parkere. Kie vorto ne estas sciata, lasu la lokon blanka aŭ la anglan vorton, sed traduku aŭ uzu ĉiujn vortojn ĉirkaŭ ĝi. Post ol fini sekcion, kaj ree ĉe la fino de la tuta ekzameno, la kandidatoj korektu ĉion laŭeble. NE SKRIBU ION AJN SUR LA DEMANDOPAPERON, KIU DEVOS RETRODONATI AL LA EKZAMENISTO KUN LA RESPONDOPAPEROJ. NENIUJ PAPEROJ POVAS ENPORTATI NEK ELPORTATI EN AŬ EL LA EKZAMENĈAMBRO. La kandidato havos ĝis kvar horojn aŭ 2 x 2 horojn por skribi siajn respondojn.

Ekzamenistoj ne donos iun ajn informon al la kandidatoj rilate la demandojn en la ekzamenpaperoj. Neniuj libroj aŭ notoj, nek iu alia papero, rajtos esti en la ekzamenejo escepte de la Ekzamendemandaro kaj la papero por la respondoj donita de la ekzamenisto. ĈIU PAPERO DONITA EN LA EKZAMENO DEVOS ESTI RETRODONATA AL LA EKZAMENISTO ĈE LA FINO DE LA EKZAMENO."

(Sen la ĉi supraj striktaj instrukcioj la sama ekzamenenhavo ne povus uzati en venontaj ekzamenoj).

*Marcel Leereveld*.

## DENOVE.

La vorto "dekomence" signifas "*from the beginning*". La vorto "denove" signifas "*from when it was new*". Ekzemploj: "Mi ŝatis tiun aŭtomobilon dekomence"; "Mi posedas tiun aŭtomobilon DENOVE" signifas "*I own this car from when it was new" NOT "AGAIN"!. "again"* = "refoje, aŭ ree". Zamenhof faris la eraron pro la franca lingvo (*de nouveau*). "denove" signifas nur "*when it was new*".

*Marcel Leereveld*.

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au




## La interreta peticio kun pli ol 25 milionoj da subskribantoj

Ĝi estis lanĉita la 17an de julio 2021 kaj ankoraŭ kreskas ĉiujn minutojn (nun 25,000,000)
La interreta peticio postulas ke la OMS (monda sana organizo) inspektu la laboratorion Fort Detrick, Usono por serĉi la originalan kaŭzon de kovida viruso.

300 reprezentantoj de 100 landoj kaj regionoj subskribas komunan deklaron kontraŭ la laboro de politikoj pri origino-spurado de OMS pri politikado de OMS
300 representatives from 100 countries and regions sign joint statement opposing the WHO politicizing virus origin-tracing work - Global Times
https://vote.huanqiu.com/af96c/?sign=true Tiu ligilo montras la nunan nombron da subskribantoj

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★



**3ZZZ**..... Ĉu vi jam scias multon pri palimpsesto? Se ne ,aŭskultu la elsendon de la 2a de aŭgusto en 3ZZZ. Diverseco de opinioj pri la vakcinado kontraŭ koronaviruso kaŭzas konfliktojn . Vi trovos eĥojn pri tiu problemo en la sama elsendo.

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



**SOLVO DE LA KVIZETO 46**

1). A). la vorto "kiun" estas la (rekta) objekto en la suborda frazo, kaj ĝi estas la rilata pronomo
de tiu suborda frazo, kaj B). La subjekto en la ĉeffrazo estas "Tiu" kaj en la suborda frazo la subjekto estas "mi".

2). A). NE estas suborda frazo en ĉi tiu longa frazo.
B). "Ĝi tiras la homan familion".
C). Ĉar la vortoj "homan familion" estas la gramatika objekto ĉe la verbo "tiras".

3). Ĉar ĝi estas la gramatika objekto ĉe la verba parto "soifi" de la adjektiva "soifanta".

. *Marcel Leereveld.*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***